N-ro 1 - 2013

Martinus Institut

# Kosmos

## La Kosmologio de Martinus

**Martinus:**
Al la legantoj

**Martinus:**
Ĉu la terhomo havas liberan volon?

**Ole Therkelsen:**
Profetaĵoj pri Martinus 2, Mitar Tarabić

**Erik Gerner Larsson:**
Martinus 10, La akceptemo de la homaro rilate al la nova mondimpulso 2

**Josef Shemer:**
Mi estas judo

**Mihai Trifoi:**
Agado en Rumanio

**Olav Johansson:**
Karmo – tikla temo



Esperanto

**80-jara jubileo de Kosmos**
Martinus-Instituto fondiĝis en 1932, kiam la unua volumo de *Livets Bog* eldoniĝis. [Ĝis 1945 la nomo de la Instituto estis *Livets Bogs Bureau*]. Dum la jaro 1932 Martinus publikigis serion da 11 artikoloj en la dana revuo O.M. (Okkult Magasin). Tiam li komencis pensi, kial do ne skribi artikolojn en propra revuo, kaj la 1-an de aprilo 1933 aperis la unua mumero de *Kosmos*, monata revuo pri *La spirita scienco de Martinus*. Per ĉi tiu numero ni do povas celebri la 80 jaran jubileon de *Kosmos*, revuo de Martinus-Instituto.

La du ĉefaj artikoloj de Martinus en la plej unua numero de *Kosmos* estis *Til læserne* (Al la legantoj) kaj *Har det jordiske menneske en fri vilje?* (Ĉu la terhomo havas liberan volon?). Sur la fronta paĝo vi povas vidi la junan Martinus ĉe la skribmaŝino sur skribotablo, kie li skribas – *al la legantoj.* En la dua ĉefa artikolo Martinus pritraktas la grandan kaj gravan filozofian problemon pri la libera volo.

La revuo de Martinus-Instituto en esperanto aperis iom neregule dum kvar periodoj 1946-1947, 1958-1959, 1969-1974 kaj 1995-2013. Portempe eo-Kosmos aperas nur dufoje jare, sed esperebIe pli ofte estontece. Laŭ deziro de Martinus, la revuo Kosmos en iom fora estonteco aperos samtempe kun la sama enhavo en ĉiuj diversaj lingvoj.

En la dua el kvar artikoloj pri profetaĵoj pri Martinus, Ole Therkelsen skribas pri la serba viziulo Mitar Tarabić (1829-1899), kiu parolis pri *la Viro el la Nordo.*

En la deka el dek du artikoloj Erik Gerner Larsson en 1939 skribis pri *La akceptemo de la homaro rilate al la nova mondimpulso.*

L. Zamenhof neniam konsideris sin polo, ruso aŭ litovo. Do, kio li konsideris sin? – Josef Shemer skribas interesan artikolon pri la judeco de Zamenhof.

Mihai Trifoi, kiu tradukis plurajn librojn de Martinus el Esperanto en la rumanan lingvon, skribas pri la agado en Rumanio.

Membro de la Kosmos-redakcio (dana-sveda) Olav Johansson skribas pri *Karmo – tikla temo.* Kiam la teamestro de la angla nacia futbala teamo, Glenn Hoddle, esprimis sin pri karmo en gazeta intervjuo, kiu kaŭzis grandan indignon, li tuj estis maldungita.

Fine de ĉi tiu numero estas kelkaj informoj pri Martinus-Instituto kaj Martinus-Centro en Klint ĉe la marbordo. En la somero 2013 ne estos aparta esperanta semajno en Klint, sed eble oni surloke spontane povas starigi esperantan studrondon dum la du internaciaj semajnoj, kiuj okazos dum la periodo 27/7 – 10/8.

La 98-a Univesala Kongreso de Esperanto okazos en la ĉefurbo de Islando, Rejkjaviko, dum la semajno 20/7-27/7, 2013.

*Ole Therkelsen*



# Al la legantoj

de Martinus



**1. La dia saĝo elfluegas ĉie ajn**
La tergloba homaro jam atingis stadion en sia evoluo, kie ĝi devas lerni kompreni, ke la dia saĝo elfluegas ĉie ajn. Dio parolas al la homoj per ĉiuj aferoj, agrablaj kaj malagrablaj, per krizoj, malriĉeco kaj senlaboreco, per milito, revolucio kaj sufero same kiel per saneco, forteco kaj bonfarto, per amo, toleremo kaj scio. Ĉio estas elradiado de la sama estulo. Ĉio estas parolo, kiu sonoregas tra la tuta universo, tra mikrokosmo kaj makrokosmo. Ĝi vibradas en la brilo de la steloj. Ĝi lumas en la movado de la planedoj. Ĝi estas flustrata per la senbrua venteto kaj murmurata en la profundo de la arbaro. Ĝi estas fajfata per la sirenoj de la fabrikoj kaj sentata en la bruo de la maŝinoj. Ĝi estas kantata super la lulilo kaj parolata ĉe la tombejo. Ĝi estas antaŭsento, certeco kaj kredo. Ĝi estas scio, ekkompreno kaj espero. Ĝi estas morto, releviĝo kaj vivo. Ĝi estas koloro, vibrado kaj lumo. Ĝi estas ĉio, kio entute estas sensebla, pensebla kaj spertebla. Ju pli tiu parolo estas komprenata de la individuo, des pli ĝi sin montras kiel konfirmo, ke "ĉio estas tre bona", kaj sekve ĝi montiĝas kiel identa kun la plej alta amomanifestado kaj saĝoinstruo. Tial ne estas malfacile kompreni, ke egalus al naiveco, komenci monopoligi, enkapsuligi aŭ limigi tiun ĉiopovan voĉegon al nur unuopa religio, sekto aŭ kredo, tiel ke ĝi nur povus manifestiĝi pere de dogmo, predikanto aŭ mediumo, per libro, revuo aŭ "mesaĝo" k.s., senkonsidere kiom ajn dia kaj sincera ĉiu tia realaĵo estus. Ĉi tio kompreneble ne estu komprenata tiel, ke oni malestimu aŭ ignoru la menciitajn realaĵojn, sed la nuna evoluo postulas, ke la okuloj de la homoj malfermiĝu al la fakto, ke tiuj, ĉiu unuope, konsistigas nur unu unuopan radion, unu unuopan frazon de la antaŭe menciita kolektita dia amomanifestado kaj saĝoinstruo. Ĉiu ajn alia formo de kompreno, kiu celas fari kelkajn el tiuj realaĵoj "la sola savo", estas iluzia kaj per tio ruiniga al la dia forto kiu enestas la koncernan realaĵon. Malferma agnosko de tio, ke "ĉio kunlaboras al bono, por tiuj kiuj amas Dion", aŭ alivorte, kompreno de tio, ke nur ĉiuj travivaĵoj de la vivo kune povas krei la dian instruon, la dian edukadon, la dian amon, kiu sole povas konduki la individuon antaŭen al klariĝinta vivo aŭ fari ĝin "unu kun la vojo, la vero kaj la vivo", tiel montriĝas kiel la bazo, sur kiu restos la nun komenciĝanta nova mondepoko.

**2. Amoceano kiu estas natura unuiĝo de amgutoj**
Kiam mia laboro, kio signifas la eldonitan unuan volumon de "Livets Bog" (La Libro de la Vivo), miajn prelegojn kaj la sur tiuj bazitajn studrondojn en la tuta lando, komencas veki intereson, komencas krei movadon, estas, fone de la antaŭaj priskriboj, tute necese, ke tiu movado ne pro misgvido limiĝu,

enkapsuliĝu aŭ kristaliĝu en asocion, sekton aŭ religian komunumon kaj tiel fariĝu io unuflanke monopoliga "sole sava". La misio de mia laboro ja estas gvidi la homojn al la propra "parolo" de Dio, manifestata forme de la ĉiutagaj travivaĵoj, kaj tiel fari ilin liberaj spiritaj esplorantoj kaj ne "oficistoj" kaj "subuloj" en artefarita spirita asocio.

Cetere, neniu ajn spirita entrepreno povas efektive resti kunigita sen bazo de amo kaj la sekva kapablo praktiki idealismon, toleremon kaj respekton al ĉio kaj ĉiu. Ĉiuj spiritaj asocioj fonditaj sur aliformaj bazoj kiel: interkonsentoj, kontraktoj aŭ membrokartoj, tial estas falsaj aŭ hipokritaj samgrade kiel al la "membroj" mankas kapablo reprezenti aŭ praktiki la leĝojn, interkonsentojn, instrufrazojn aŭ idealojn de tiuj asocioj. Sed asocio, kiu estas bazita nur sur la denaska amkapablo ĉe la individuoj, ja estas vera aŭ natura asocio kaj povas ekzisti nur sub la nocio: "Kion kunigis Dio, tion ne povas disigi la homoj". Ĝi tial bezonas neniun leĝon, neniun interkonsenton, neniun ordonon, neniun promeson pri sia unueco. Ĉiu unuopa "membro" ja estas "guto" da amo. Kaj same kiel la akvoguto havas la sorton unuiĝi kun aliaj akvogutoj kaj tiel kontribuas al la kreado de la oceano, tiel la "amgutoj" ankaŭ havas la sorton unuiĝi kun aliaj "amgutoj", per kio natura unuiĝo aŭ "amoceano" aperas. Sed same kiel la akvoguto ne povas miksiĝi kun oleo- aŭ grasogutoj, tiel la "amguto" ankaŭ ne povas miksiĝi kun la "netoleremo-", "envio-", "avido-" kaj "kalumniogutoj" ktp. Kaj estas ĝuste tio, kio, eĉ se nekonscie, estas celata per la multaj diversaj religiaj kolektiĝoj aŭ asocioj. Tiuj estas je alta grado kompareblaj kun botelo, en kiu oni helpe de "membrokarto" miksis "amgutojn", "netoleremo-", "envio-" kaj "avidogutojn" ktp., kaj sur kiu oni metis etikedon kie estas skribita "pura amo". La plejmulto de tiaj "boteloj" aŭ religiaj asocioj ene de la terglobaj zonoj montras je ne malgranda amplekso reagojn inter tiaj nemikseblaj "gutoj" ene de siaj propraj kadroj aŭ limoj, sed ĉar ili ne konas la verajn faktojn kompreneble anoncas sin esti esprimo de la pura, nefalsigita amo, saĝo aŭ la sola savo. Estas tiu iluzia stato, kiun la mondo komencas ekvidi, kaj for de kiu mi deziras gvidi ĉiujn interesatojn kaj amikojn de mia laboro.

**3. Livets Bog estas libro de amo, kiu ne instigas al kreado de asocioj kaj sektoj**

Ĉar "Livets Bog" estas libro de amo, ĝi tute nature aceptiĝos de ĉiuj "amgutoj" ene de la sektoj, asocioj kaj religioj tra la mondo, aŭ alivorte, ĝi estas ilo por ĉiuj tiuj estuloj, kiuj pro sia evoluinta amkapablo jam estas unuigitaj fare de Dio. Pro tio ne estas bezonataj eksteraj rimedoj, membrecoj aŭ rekoniloj por tiu natura spirita asocio. Ĉiu ja portas sian "stampon", sian "membrokarton" videble en sia karaktero. Tiuj estuloj, kiuj ne portas la membrecon en sia karaktero, sed nur kiel paperan atestilon aŭ asocian rekonilon, ja povas imponi nur naivulojn same kiel "belaj vortoj plezurigas malsaĝulojn".

Ĉar mi tiel plene konsentas pri tio, ke nur Dio povas kunigi kaj disigi, mi pri tio neniel okupiĝas. Sekve mi neniel povas esti bazo por establi spiritajn ordenojn, fondi religiojn, nek krei sektojn aŭ aliajn formojn de specifaj eksteraj asocioj, sed estas veninta en la mondon sole nur por esti helpanta faktoro en la de Dio mem ĉi-surtere fondita "paroĥanaro", kies "membroj" estas la "amgutoj" aŭ la nenombritaj kaŝitaj estuloj, kiuj je ĉiu socia nivelo, ĉiuj sektoj, ĉiuj kredantaroj, ĉiuj mondkonceptoj hodiaŭ povas ami sian proksimulon, povas toleri aliulan koncepton pri la universo, la vivo kaj Dio, respektas ĉion vivan kaj kiuj tial rifuzas malĝojigi,

mortigi, buĉi kaj kripligi. Al tiuj mi estas sendita, kaj nur tiuj iras renkonte al mi. Ĉiuj aliaj ne bezonas min, ĉar ili ne komprenas min. Ili eĉ kreus reziston kontraŭ mia misio per siaj ankoraŭ ne venkitaj primitivaj inklinoj kiel netoleremo, malhonesteco kaj kalumniemo ktp., kiom ajn elstarajn postenojn, gradojn aŭ klasojn ili reprezentus ene de sia ordeno, sekto aŭ kredkonfeso. Sed al tiuj estuloj mi nur povas "turni la dekstran vangon, kiam mi estas frapita sur la maldekstra", kaj instigi ĉiujn aliajn "pardoni ilin, ĉar ili ne scias kion ili faras". Dio parolas al ili alimaniere, de aliaj sferoj, per aliaj konsciniveloj.

**4. Fundamenta parto de mia laboro estas la kreado de Livets Bog (La libro de la vivo)**

Kiam temas pri mia laboro, ĝi do baziĝas sur tio, ke ĝi, sen ke iu pro tio devas cedi sian eventualan spiritan subtenon aŭ inspiran forton de aliaj spiritaj centroj aŭ saĝofontoj, ĉu religioj, sektoj, libroj, aŭ revuoj, estu inspira por ĉiu homo, en kiu troviĝas toleremo, amo al la proksimulo, spirita intereso kaj sopiro al pli alta formo de vivspertado kaj kiu havas talenton por kompreni la novan mondkulturon.

Fundamenta parto de tiu mia laboro estas la manifestado de "Livets Bog", kiu identas kun la analizoj de la universo, la vivo kaj ties leĝoj, Dio kaj la vivaj estuloj, forme de unu ununura logike kunligita pensovico videbligita ne sole por la "kredo" aŭ la sento, sed ankaŭ por la inteligento aŭ la racio, kaj kiu samtempe garantias la identecon de la sama libro kiel absolutan veron per tio, ke la menciita pensovico rezultas en la eterna kaj fina ĉefkonkludo de la vivo: "Ĉio estas tre bona". Sed, kiel vi scias, de tiu ĉi libro ĝis nun nur la unua volumo estas eldonita, pro tio, ke la sekvaj volumoj ja ne estas pretaj. Ĉar ne eblas manifesti tiujn volumojn ene de la daŭro de tagoj nek semajnoj, sed nur dum jaroj, mi ne intencas, same kiel mi ne sentas tion ĝusta, kaŝi min en soleco kaj lasi ĉiujn miajn jam akiritajn multajn amikojn kaj interesatojn en blinda kaj subfosa atendado, dum mi finfaras la venontajn volumojn. Tamen, estas neeble por mi plene okupiĝi pri prelegoj, ĉar tiuj ja postulas vojaĝojn, kaj vojaĝoj postulas tempon, kio sekve povas signifi nur malfruigon, eble eĉ obstaklon por la plua kompletigo de la libro. Kompreneble mi opinias, ke mi, simile al mia kutimo, povos de tempo al tempo fari kelkajn prelegojn je tiaj okazoj, kiaj ne malfruigos mian laboron pri la libro, sed mi ne povas plene okupiĝi pri tiuj, antaŭ ol "Livets Bog" estos finmanifestita.

**5. La revuo "Kosmos" estas utila suplemento al mia laboro**

Sed certe estos tiom da liberaj momentoj, ke mi povos verki artikolojn pri diversaj aktualaj temoj, prilumitaj de la kosma sfero aŭ deire de tiuj gvidlinioj, en kiujn ili evoluos en la nova mondkulturo. Samtempe mi sentas neceson pri la multaj demandoj direktitaj al mi, ke mi respondu al tiuj, kiuj havas ĝeneralan intereson. Ĉar ja postulus tro da tempo persone respondi ĉiun unuopan demadon, oni povas kompreni, ke revuo kiel ĉi tiu ("Kosmos", red.) povas havi grandegan utilon. Krome aldoneblas la fakto, ke en ĉi tiu revuo ankaŭ povas kreiĝi rubriko por interpretado kaj klarigado de la punktoj en „Livets Bog" kiuj estas plej malfacilaj al la ne-ekzercintaj aŭ ne-trejnitaj spiritaj esploristoj, per kio „Livets Bog" sekve iĝus alirebla al pli granda rondo, ol alie estus la kazo, kaj samtempe estu rubriko, en kiu la interesataj legantoj, kiuj havas konfirmajn, aŭ por la movado utilajn, spertojn povus tion vortigi; kaj tial la neceso eldoni tian revuon ŝajnas esti el tia karaktero, ke ne plu eblas eviti rigardi ĝin afero de konscienco por la

personoj plej konfidaj je miaj misio kaj laboro. Kaj ankaŭ estas surbaze de la varma interesiĝo kaj sindono al la movado fare de tiaj komprenaj homoj, ke la ekonomiaj obstakloj de la unua volumo de "Livets Bog" kaj ceteraj realaĵoj kiuj koncernas la movadon estis venkitaj, kaj ke ĉi tiu revuo jene komencas eldoniĝi. Tio estas des pli aprezinda afero, pro tio ke la produktado de "Livets Bog" kostas ne malgrandan sumon, same kiel revua entrepreno ne estas malmultekosta afero.

**6. "Kosmos" kaj "Livets Bog"**

Ĉar "Livets Bog" same kiel "Kosmos" ne estas bazita sur ia ajn formo de ekonomia spekulado pri okultaj kapabloj aŭ psika scio per sensacia kontentigo de la tre vastiĝinta vulgara kaj malsaniga terhoma scivolemo, sed nur estas bazita sur la rivelo de la por la tuta homaro absolute " ununura neceso", tute senkondiĉe de tio, ĉu tiu rivelo aŭ prilumado de la veraj faktoj ŝajnas "teda" aŭ "sensacia" por la granda plimulto, kaj ĉar pli alta spirita literaturo ankoraŭ ne estas la plej pridemandata, nek "Livets Bog" nek "Kosmos" estas granda profitodona komerca projekto. Sed mi esperas, ke ĉiuj, kiuj kun vera ĝojo kaj intereso legis la eldonitan parton de "Livets Bog", ankaŭ sentos ĝojon kaj intereson legante "Kosmos" kaj subtenos ĝin per abono, precipe ĉar oni tiel helpos fari mian laboron ekonomie pli facile alirebla, tiel ke ĝi povos atingi pli grandan aron da serĉantaj homoj, kiujn ĝi alie ne atingus.

Koncerne la venontan enhavon de la revuo, mi povas mencii, ke aktualaj temoj kiel: kadavrobruligo, embrioforigo, sekseco, vivisekcio, obsedaj pensoj, natura nutrado, uzo de narkotaĵoj ktp., krom fiksaj rubrikoj: "Interpreto de Livets Bog" kaj "Demandopaĝo" estos traktataj de mi mem. Krome, estos ankaŭ spaco por spertoj kaj travivaĵoj de aliaj personoj, kiuj utilas al la movado, precipe kiam tiuj ĉi estas tiaj, ke ili ne ĝenas la karakteron de la revuo, kiuj same kiel "Livets Bog" estas tenata je nivelo, kie ĝi ne fariĝas atako al iu aŭ io, sed, kontraŭe, universala defendo de ĉio kaj ĉiu kaj tiel, harmonie kun la vera konkludo de la vivo, estas ĉirkaŭbrako de ĉiuj, kiuj direktas la rigardon al la eternaj faktoj, aŭ ĉio, kio ekzistas sub la nocio "ami sian proksimulon kiel sin mem".

*Originala dana titolo "Til læserne". Verkita de Martinus kiel la plej unua artikolo en la revuo Kosmos (n-ro 1, 1933). Artikolaro 1, artikolo n-ro. 3.*


*Traduko Mathias Dalmose, 2013.*



*Martinus prelegas*

# Ĉu la terhomo havas liberan volon?

de Martinus



**1. La respondo al tiu ĉi demando, al la granda plimulto da homoj, ŝajnas fantazia kaj stranga.**
Ĉar la viva estulo en sia absoluta analizo ne konsistigas nur pure fizikan objekton, sed estas el tiel profunda naturo, ke ĝiaj agado kaj vivspertado dependas de serio da fortoj kaj realaĵoj, kiuj ankoraŭ situas longe for de la ĉefa vojo de la kutimaj homaj pensmaniero kaj imago pri la vivo, la respondo al la antaŭe menciita demando sekve ne povas manifestiĝi sen reprezenti ĝuste tiajn fremdajn pensokampojn. Tiu respondo sekve por la granda plimulto de homoj ŝajnos nekredebla kaj stranga, precipe por individuoj, kiuj ankoraŭ estas tiom primitivaj, ke ili imagas sin aŭtoritatoj je ĉia formo de analizado, kaj tial anticipe prineas ĉion, kion ili ne komprenas aŭ kapablas rekte sensi. Tiuj ĉi linioj estas kompreneble ne verkitaj por tiaj homoj, sed por individuoj, kiuj vere havas kapablon kaj toleremon sufiĉajn por direkti la rigardon profunden, aŭ alivorte, al tiu realo, kiu sin kaŝas de la plimulto, sub la nebula vualo, kiun ni nomas "fantazio".

Al tiuj estuloj mi ĉi tie klopodos prilumeti kelkajn el la realaĵoj, kiuj antaŭkondiĉas la kreadon de la kapablo de la viva estulo agi kongrue kun sia volo.

**2. Por ekhavi liberan volon necesas ke oni povu regi la energiojn**
Por povi fari kion oni volas, oni bezonas centelcente liberan volon. Per tia centelcente libera volo estu ĉi tie komprenata ke oni komplete venkis la obstaklojn de la kontentigo de sia normala avido. Sed ĉar *venko,* kiel ankaŭ *obstakloj* nur povas ekzisti kiel identaj kun energio, ellaso de volo tiel identas kun reago inter du formoj de energio. Kaj la libera volo tial nur povas esti spertata tie, kie tiuj fortoj, kiuj reprezentas la volon, estas pli fortaj ol la fortoj, kiuj reprezentas la obstaklojn. Tie, kie la malo okazas, la individuo ja ne povas kontentigi sian avidon, kaj tial sentas sian volon malliberigita aŭ katenita. Por liberigi la volon, oni do devas atingi kapablon manifesti ĝin per fortoj, kiuj estas pli altaj ol tiuj fortoj, kiuj konsistigas la obstaklojn. Kaj estas ĝuste tiu ekhavo de la kapablo apliki pli kaj pli altajn fortojn por la manifestado de nia volo, kiun ni en la ĉiutaga vivo spertas kiel evoluon. Kiam la vivaj estuloj evoluas de malaltaj, primitivaj al alte evoluintaj vivformoj, tio efektive nur signifas, ke ili akiras kapablon apliki pli kaj pli superajn energiojn por manifesti sian volon, per kio la obstakloj samgrade malgrandiĝas kaj fine tute malaperas. Kaj la individuo tiam havas centelcente liberan volon. Ekhavi liberan volon do signifas obeemigi la energiojn aŭ la fortojn.

Mi ne povas ĉi tie pli profunde klarigi tiujn ĉi fortojn, sed devas tiurilate direkti la leganton al mia ĉefverko "Livets Bog" (La libro de la vivo). Sed mi povas indiki, ke ĉiuj fortoj de la mondo aperas laŭ kvin diversaj kreskantaj gradoj, el kiuj la supraj ligas la malsuprajn.

La libero de la volo sekve prezentiĝas konforme al tio, kaj kiam la koncernata individuo komencas regi la kvinan gradon de energio ĝi proksimiĝas al la plej alta stadio. Se ekz. ĝi atingis utiligi nur la duan aŭ trian gradon, ĝi do ne estas atinginta liberigon de sia volo, ĉar la volo tiukaze ankoraŭ ne kapablas venki la obstaklojn, kiuj reprezentas la kvaran kaj kvinan gradojn de energio.

Kiel ekzemplo pri la estuloj, kiuj evolue atingis nur utiligon de la unua grado de energio, mencieblas tiuj, kiuj por ni aperas kiel "plantoj". Plantoj ja ankaŭ estas esprimo de vivaj estuloj, sed ĉi tiuj estuloj havas la plej primitivan volon de la ekzisto, aŭ volon, kiu estas nur latenta. Post tio venas tiuj estuloj, kiuj ĉefe aplikas la duagradan energion. Tiuj estuloj konsistigas tion, kion ni nomas "la besta regno". Ĝuste tiu regno konsistigas regionon por kiu la terglobo en alta grado estas scenejo. Estuloj kun triagrada volenergio konsistigas "la veran homregnon". Sed tiu regno troviĝas sur la tero ankoraŭ nur en sia embria stato, ĉar la terhomoj ankoraŭ plejparte utiligas duagradan volenergion kaj je nur preskaŭ latenta formo aŭ en malgranda kampo povas utiligi la sekvajn gradojn de energio. Tial ili devas esti analizitaj kiel "transiraj estuloj inter besto kaj homo".

### 3. Ĉar la homo regas nur certagrade la energiojn, ĝi perceptas la penson pri libera volo kiel utopion

Jen ni trovis la limon inter tiuj fortoj, kiujn la evoluantaj terhomoj ekregis, kaj tiuj, kiujn ili ne regas. La energiformoj, kiujn la menciitaj estuloj regas, sekve reprezentas la unuan kaj duan gradojn. Ĉi tiuj du gradoj konsistigas kun la tria grado tion, kion ni nomas "fizika materio" aŭ "la materiaj fortoj". Kaj tiujn fortojn la terhomoj ĝis ne malalta grado atingis obeemigi. Ili tiel certagrade fariĝis mastroj de fajro kaj regantoj de fulmo. En la formo de "ĉevalpovoj" ili igas la elementojn porti ilin trans tero kaj maro, tra aero, akvo kaj etero. Helpe de teknikaj aparatoj ili plikapabligis siajn fizikajn sentumojn. Ili komencas ekkoni fremdajn mondojn. Ili iniciĝis pri la movoj de la elektronoj. Unuopa individuo povas paroli al la tuta tero kaj tiel esti samtempe aŭdata tra la tuta mondo. Per la fotografia tekniko ĝi povas eĉ en la mallumo de la nokto rigardi la lumon de la tago. La homoj do grandparte estas atingintaj igi sin centelcentaj regantoj super certaj partoj de la mondenergia kampo, kaj tiel samgrade atingis centelcente liberan volon aŭ kapablon fari kion ili volas en tiu kampo. Sed malgraŭ ĉio, la tiel konkerita kampo tamen estas el tiel malimpona dimensio kompare kun la kampo, kiu ankoraŭ ne estas regata de la homa konscio, ke la homoj perceptas la penson pri libera volo kiel utopion, kiel malnormalaĵon, precipe ĉar kie la homoj ne regas la fortojn, la fortoj regas ilin.

### 4. Ĉiu perfekta rego de la energioj estas esprimo de amo

Ĉar ĉiu absoluta perfekteco baziĝas sur la regado de la viva estulo super la fortoj kaj ne la malo, kaj ĉar la menciita perfekteco samtempe estas bazo por la absoluta agrablo, dum neperfekteco estas bazo por la absoluta malagrablo, la fortoj estas treege agrablaj tie, kie ili estas faritaj "servantoj", sed treege malagrablaj tie, kie ili estas ankoraŭ "regantoj" de la estuloj. Kaj ĝuste kunlige al tio ĉi, oni nomas manifestaĵojn, kiuj reprezentas absolutan regon super la fortoj "idealoj" aŭ "la bono", same kiel tiaj manifestaĵoj ja ankaŭ aperas kiel la kerno en ĉia religieco aŭ diokultado. Ĉu ne ĝuste la manifestoformon, "povi fari, kion oni volas", oni atribuis al la plej alta estaĵo aŭ Dio, kaj samtempe promesis al la homoj, kiuj aperos "laŭ lia bildo

simila al li"? Kaj ĉu ne estas ĝuste kunlige al la supre menciita, ke oni nomas manifestaĵojn, kiuj ne reprezentas plenan regon de la energioj, "malbono" kaj "puno"? Ĉu ne "infero" estas esprimo de la imagita plej alta kontrasto al la agrablo, same kiel "la diablo" estas esprimo de la imagita plej alta malo al la ideala estulo?

Por la altevoluinta okultulo, kio signifas estulon, kiu evolue estas longe antaŭ la granda aro de siaj kunuloj kaj tial havas plene disvolvitajn sentumojn en kampoj, kie la kunuloj ankoraŭ estas senkonsciaj, ekzistas nenia "malbono", nenia "puno" kaj neniu "Diablo" aŭ "la Malbonulo". Ĉia absoluta malagrablo same kiel ĉia absoluta agrablo estas por li esprimo nur pri ne-regataj respektive regataj energioj. Kiel sekvo de tiu ĉi klarvido, li kompreneble estas preparita por akiri plenan regon super la energioj kaj tiel sekve aperas kiel des pli granda reprezentanto de la absoluta agrablo, ju pli li en ĉi tiu akirado troviĝas antaŭ siaj kunuloj. Liajn manifestaĵojn oni do povas esprimi kiel absolutajn agrablomanifestaĵojn samgrade kiel li estas akirinta regadon de la fortoj. La agrablo naskita de tiu ĉi regado identas kun tio, kion ni nomas "amo". Ĉiu perfekta manifestaĵo aŭ rego de la fortoj sekve povas efektive ekzisti nur kiel esprimo de amo. Kaj jen ni alvenas al la senvualigo de la kialo, pro kiu la granda ordono "amu unu la alian" konsistigas "la plenumadon de la leĝo" kaj preskribiĝas kiel la vojo al la vivo, ĉar la vivo en sia plej alta kulmino aŭ perfekteco ja povas ekzisti nur kiel la regado de la fortoj, kio ja identas kun amo.

## 5. La mensaj funkcioj de la homo estas portataj de pli delikataj formoj de elektraj kurentoj, radioj aŭ ondoj

Sed ĉar amo do estas esprimo de la vera regado de la fortoj, al la terhomoj restas ankoraŭ relative longa trejnado ĝis ili povos superi la pli altajn gradojn de energio, kaj tiel spertos absolute liberan volon. Ĉi tiuj energioj do ne estas fizikaj, kaj tial ili kutime ankaŭ estas esprimataj kiel "spiritaj fortoj". Tiuj ĉi fortoj ne estas rekte videblaj per la fizikaj sentumoj, ĉar ili vibradas je frekvencoj, kiuj estas tute mikroskopaj kompare kun la pli krudaj frekvencoj, kiujn reprezentas la fizikaj energioj, kaj por kiuj la fizikaj sentumoj estas agorditaj. Sed malgraŭ tio, ke ĉi tiuj spiritaj fortoj ne estas fizike videblaj, tio kompreneble ne signifas, ke ili estas malnaturaj aŭ nerealaj, tute male. Ili estas same realaj kiel la fizikaj fortoj kaj efektive povas esti esprimataj kiel tipo de pli alta aŭ pli delikata formo de elektro. Tio sekve siginifas, ke la spiritaj funkcioj de la individuo efektive identas kun responde pli altaj aŭ pli delikataj formoj de elektraj kurentoj, radioj aŭ ondoj. Por ke la viva estulo povu apliki ĉi tiujn kurentojn, ĝi bezonas ricevilon. Kaj ĝuste tian ricevilon ni retrovas en ĝia organismo. Tiu ricevilo efektive konsistigas, en la formo de cerbo, nervaro kaj ceteraj organoj, akumulilan kaj antenan instalaĵon plutenatan de eterna "io", por kies priskribo ĉi tie mankas loko, sed kiu en "Livets Bog" estas priskribita sub la nocio "X1" aŭ la "mio" en la viva estulo. Tiu ĉi ligo de la mio al la energioj, al la vivaj estuloj perceptiĝas kiel "penso", kaj tiu percepto identas kun la vivspertado.

Rilate al ĉi tiu spertado, ĝi aperas des pli agrabla, ju pli altan gradon de energio la estulo trejnade atingis apliki kiel materialon por sia penso kaj sekve por sia volo. Ĉar ĉi tie surtere, krom la agrablostatoj, kiujn mi pli frue menciis kiel esprimojn de la regado de la fizika energio, ankaŭ troviĝas nombrego da malagrablostatoj kiel: milito, murdo, mortigo, vundado kaj ĉiaspeca sufero, tiuj ĉi lastaj do estas esprimo de tio, ke la terhomo ankoraŭ ne ĝis sufiĉa grado

estas reganto de, aŭ povas labori per, la plej altaj energioj kaj tial ankoraŭ je egala grado estas barita de posedo de tute libera volo. Tio, kio sekve estas la granda bezonaĵo por ĉi tiuj estuloj, estas sin trejni ĝis perfekte povi kontroli sian penson aŭ volon per la plej altaj energioj aŭ spiritaj fortoj.

### 6. Ĝis nun la terhomo en sia evoluo atingis regi nur instinkto- kaj pezenergion

Kiel menciite, la homoj de la tero evolue pasis la kulminon de la unua kaj dua gradoj de la mondenergioj. Tiuj du gradoj estas bazo por la realaĵoj, kiujn ni nomas "instinkto" kaj "pezo". Tiuj du energiformoj lige kun latenta formo de triagrada energio kune konsistigas la bazon de ĉia volaktivigo, kiu subtenas la principon "mortigi". Ĉi tiu principo aŭ ĉi tiu volaktivigo tial aperas kiel baza vivkondiĉo en la bestoregno. Kaj la homoj de la tero tiel estu rigardataj kiel apartenantaj al tiu regno samgrade kiel ili reprezentas tian formon de volaktivigo.

La energiformoj aŭ pli altaj spiritofortoj, kiujn la terhomoj ankoraŭ ne regas, sekve estas la tri lastaj gradoj de la mondenergioj. Tiuj samtempe estas la bazo por la realaĵoj, kiujn ni spertas kiel: senton, inteligenton kaj intuicion. Sed ĉi tie ni devas noti, ke la lasta grado krom intuicio ankaŭ konsistas el la energiformo, kiu estas la bazo por tio, kion ni nomas "memoro". La ĉi tie menciitaj energioj do konsistigas tiujn spiritajn fortojn, kiujn la terhomoj ankoraŭ povas apliki nur en tre komencaj aŭ primitivaj formoj. La grandaj malagrablo- aŭ suferostatoj, sub kiuj la terhomoj vivas estas esprimo de tio. La terhoma evoluo ĝuste progresas direkte al trejnado de la individuoj al pli kaj pli perfekta regado de ĉi tiuj energioj. Kaj ni tial vidas ĉi tiun evoluon esti forte stimulata per diversaj realaĵoj. Per religioj, preĝejoj kaj temploj, nobligo de la sento estas celata. Kaj per universitatoj, lernejoj kaj edukaj institucioj la inteligento estas povigata. Kaj kiam la individuo atingas certagradan plene ekvilibran regon de ĉi tiuj energioj, la perfekta amo estiĝas. Kaj per tiu, iom post iom, estiĝas la perfekta rego de la plej alta vidkapablo kaj kreivo de la vivo: la intuicio, kiu sekve en kunligo kun perfekta memoro faras la vivon kulmino de tiu sperto de senmorteco, kiun ni nomas "beato".

Pere de kompleta rego de la bazenergioj de la universo en volgvidado, la viva estulo tiel atingas la plej altan sperton de amo, kreado kaj beato. Sed kiam la terhomoj atingas reprezenti tian konsciostaton, ili ne plu estas homoj laŭ la teraj nocioj, sed apartenas al zonoj aŭ regnoj, kiuj ne estas *el tiu ĉi mondo*, kaj la respondo al la demando, ĉu la terhomo havas liberan volon, tial estas esprimebla jene:

Ĉar spertado de absolute libera volo dependas de regado de la kvin gradoj de la bazenergioj de la universo, kaj ĉar la terhomoj estas nur, kun ioma marĝeno, pasintaj la kulminon de la rego de dua grado, neniu el ĉi tiuj estuloj estas plene kapablaj fari tion, kion ili volas, sed estas ligitaj de tiuj fortoj, kies regon ili evolue ankoraŭ ne atingis.

Sed ni vidis, ke la eterna ordono "amu unu la alian" estas scienco kaj ne superstiĉo, kiam ĝi estas donata kiel la rimedo por liberiĝo aŭ kiel la vojo al la vivo.

*Originala dana titolo "Har det jordiske menneske en fri vilje?". Verkita de Martinus kiel artikolo por Kosmos 1933, n-ro 1. Artikolaro 1, artikolo n-ro. 4.*

*Traduko Mathias Dalmose, 2013.*



# Profetaĵoj pri Martinus 2
## Mitar Tarabić pri la Viro el la Nordo

de Ole Therkelsen

**1. Serba profetaĵo pri la Viro el la Nordo**
Serba viziulo nomata Mitar Tarabić (1829-1899) el Kremna proksime al la urbo Uzice famiĝis pro sia longa vico da precizaj profetaĵoj pri la estonteco en Balkano kaj en Eŭropo. Unu el liaj neklarigitaj profetaĵoj temas pri *la Viro el la Nordo*.

Mitar Tarabić: "Unu hometo, kiu revelacios sin ĉe malgranda popolo *tute en la nordo*, la homojn instruos pri ĉioamo kaj kondutmaniero, sed ĉi tiu viro havos multajn falsajn adeptojn kaj kontraŭulojn kaj havos kaj prosperon kaj malprosperon. La homoj en liaj ĉirkaŭaĵoj ne komprenos kio estas vera homamo. Sed *liaj saĝolibroj* kaj ĉiuj vortoj kiujn li parolos al homoj, estos konservitaj, kaj la homoj ekkomprenos kiajn falsajn ideojn ili havis." (Martin Marinković, Kosmos, n-ro 7-8/1990).

**2. Interpreto de la serba profetaĵo**
Eksterlande la kono pri Martinus estas tre malgranda, kaj tial oni demandis sin, kiun homon povus aludi ĉi tiu profetaĵo. Sed la supra karakterizaĵo povas esti tute konforma pri Martinus. Li vivis kiel ordinara "hometo" kies vivo ne estis multe priatentata. Koncerne "liajn saĝolibrojn" Martinus mem karakterizas *La Libron de la Vivo* kiel "la eternan Saĝon" (LB1, par. 7), kaj *La Trian Testamenton* kiel libron "de saĝo". (*La Intelektigita Kristanismo,* par. 6).

La "vortoj kiujn li parolis" en siaj prelegoj estis registritaj sonbende, stenografiitaj kaj skribitaj, tiel ke ili kiel artikoloj povis esti konservataj por la estonteco. Estis kaj adeptoj kaj kontraŭuloj. Martinus jen ricevis laŭdegojn, jen oni atakis lin esti trompisto, fraŭdanto, ĉarlatano kaj falsa profeto. En sia artikolo *Ĉirkaŭ la kreado de la Libro de la Vivo* Martinus karakterizis siajn kontraŭulojn, depende de la evoluo kaj ekvilibro de iliaj sentokapablo kaj inteligento, kiel C-, D- kaj E-kritikantojn, kaj analizis la verajn kaj falsajn adeptojn en la formo de respektive A- kaj B-kritikantoj. (*Artikolaro 1,* par. 14.6-9 kaj 14.25-29).

Martinus mem ankaŭ menciis ke liaj libroj estas skribitaj pli por la homoj de la estonteco ol por tiuj de lia vivtempo. Malnova proverbo diras ke oni ne fariĝas profeto en sia lando, kaj la reganta materiisma vivkoncepto kunkaŭzas ke multaj niatempe havos "falsajn ideojn" pri la Viro el la Nordo kaj liaj saĝaĵoj.

Martinus mem iom ŝerce diris: "Surpriziĝos la indiĝenoj [samlandanoj], kiam ili ekkomprenos kion mi skribis."

*Traduko Jens S. Larsen 2013*

KOSMOS 1939, n-ro 10, p. 78



# Martinus 10
## La akceptemo de la homaro rilate al la nova mondimpulso 2

de Erik Gerner Larsson

Por helpi la surtere vivantan homaron pri la batalo kontraŭ ĉi tiu malfeliĉa indigno, kiu, kiel netoleremo, sed sub alia vestaĵo "sankta kolero", "justa indigno" k.t.p. efektive kaŭzas multan ĉagrenon kaj doloron, kaj en sia loka naturo estas same nerajtigita kaj sensenca, kiel se oni ŝajnigis esti indignita pri tiuj homoj, kiuj laŭ aĝo estas pli maljunaj ol ni mem – ni nun transiras al klarigo de la diversaj kvalifikecoj de la surtere vivantaj homoj rilate al agnoskemo pri la nova spirita kulturo por tiamaniere helpi ilin al privenko de la dirita indigno, kio estas la absolute neevitebla kondiĉo por ĉiu homo, kiu serĉas la veron, kaj kiu deziras atingi "la grandan naskiĝon" kaj ricevi kosman konscion aŭ enpenetriĝon de la luma dieca klarvidebleco kaj sunluma estadmaniero de "la sankta spirito".

Por ebligi la analizadon de la spirita nivelo de la homaro estas necese por ni havi firman punkton, de kiu ni povas difini la rezultaton de niaj spertoj. Ĉi tiun firman punkton ni havas en la tenado de la sama homaro rilate al *la malnova mondimpulso*. Studante ĉi tiun tenadon ni vidas, ke ĉi tiu impulso perdis sian valoron kiel inspirilon kaj tiamaniere fariĝis antikva por miloj da homoj, kaj tio sendepende de ĝia apero kiel budhismo, mahometanismo aŭ kristanismo. Ĉirkaŭe en la mondo troviĝas hodiaŭ miloj da homoj, kiuj forlasis sian "infanecan kredon", kiuj sin levis super la nun ekzistantajn plej altajn formojn de religio.

La kaŭzo de ĉi tiu afero troviĝas en la granda evoluo de la sento kaj inteligento, kiu okazis dum la lasta jarcento. Ĉi tiu evoluo riĉigis la konscion de la homoj per materialo de sperto, kiu ebligas al ili fari demandojn, kiuj estis sen aktualeco en la epoko, kiam la grandaj religioj de siaj fondintoj estis kreataj kaj donataj al la homoj. La religioj estas nur adaptitaj por doni respondon al la plej gravaj demandoj. Sed ĉar la nivelo de la inteligento dum la tiama epoko estis tre malalta kompare kun tiu, sur kiu tre granda parto de la nuntempaj homoj troviĝas, tiam estas certe, ke la dezirego pri vera scio estas same primitiva.

Ĉar nun pasis jarmiloj post la fondado de la mondreligioj, kaj ĉi tiuj jarmiloj en ĉiuj aliaj fakoj de la konscia vivo metis sian stampon, dum la religioj ne trapasis similan evoluon, sed sub la formo de dogmoj ĉiam nur okupas siajn limigitajn kampojn, estas evidente, ke la plej progresintaj homoj kun grandaj partoj de siaj konscioj moviĝas ekster la kadroj de la religioj, jes, ke ili absolute devas esti en konflikto kun la laŭvorta formo de ĉi tiuj, kiam oni devas kredi ĝin laŭvorte kaj ne simbole, tiel, kiel ĝi laŭ la mondplano estas intencata. [Vidu Livets Bog §121-122].

Tradukis Margrethe Noll en 1939

# Mi estas judo

de Josef Shemer



*En 1859 L. Zamenhof naskiĝis sur pola tero, kvankam tiutempe Bjalistoko estis parto de la Rusa Imperio. Sed Zamenhof neniam konsideris sin polo. Ankaŭ ne ruso. Do, kio li konsideris sin?*

**Kio Zamenhof konsideris sin?**
Hodiaŭ ni jam havas sufiĉe multajn dokumentojn (gazetartikoloj, leteroj ktp), en kiuj aperas tre klare la respondo al tiu ĉi demando. Mi citos kelkajn diraĵojn de la kreinto de Esperanto, aperintajn en kelkaj el tiuj dokumentoj:

1. "Jam dum preskaŭ dudek jarcentoj nia popolo migras tra la vasta mondo sen patrujo, sen hejmo, pelata de loko al loko, kiel senhejma orfo, ĉie kuntrenante siajn suferojn, sian eternan 'demandon'". (el la artikolo de Zamenhof *Kion do finfine fari*? aperinta en la ruslingva juda gazeto *Razsvet*, 1882).

2. "Kiel lulilo de nia historia grupo, de nia 'popolo', Palestino estos same kara al hilelistoj, kiel ankaŭ al ĉiuj ceteraj hebreoj, kaj kiam hilelistoj post kelka tempo fortiĝos, ili verŝajne celos akiri kiel propraĵon tiun peceton da tero, kun kiu estas ligitaj rememoroj pri la juneco de nia popolo." (el la ruslingva broŝuro de Zamenhof *Hilelismo – Projekto de solvo de la hebrea demando*, 1901).

3. "Mi neniam kaŝas mian hebreecon kaj ĉiuj esperantistoj tion ĉi scias; mi kun fiereco alkalkulas min al tiu ĉi tiel antikva kaj tiom multe suferinta kaj batalinta popolo... Paroli detale pri mia vivo kaj pri la historio de miaj ideoj sen konstanta ripetado pri mia hebreeco estas preskaŭ neeble. Se mi ne estus hebreo el la geto, la ideo pri la unuigo de la homaro aŭ tute ne venus al mi en la kapon, aŭ ĝi neniam tenus min tiel obstine en la daŭro de mia tuta vivo." (el letero de Zamenhof sendita al A. Michaux, 1905).

4. "Pro tio, ke ĉiuj hebreoj havas komunan historion kaj la popoloj ne volas komunikiĝadi kun ni, ni tute ne nomu nin rusoj, germanoj ktp, sed nomu nin ĉiam hebreoj laŭ nacieco." (el anglalingva intervjuo kun Zamenhof en *Jewish Chronicle*", 1907).

5. "Sed se la korespondado diras, ke mi hontas pri mia judeco... mi devas kolerege elkrii: tio estas abomeninda mensogo. Ĉiuj esperantistoj en la mondo scias tre bone, ke mi estas judo." (el respondletero de Zamenhof aperinta en la usonjuda jidlingva gazeto *Di Varhajt*, 1912).

6. "Kvankam pro miaj konvinkoj mi ne povas persone partopreni en Viaj laboroj, tamen mia multe suferinta kaj suferanta gento estas por mi ĉiam tre kara." (letero de Zamenhof al Wilhelm Heller, sekretario de la Tutmonda Esperantista Hebrea Asocio, 1914).

Zamenhof naskiĝis en juda (sinonime: hebrea) familio en 'preskaŭ juda' urbo: En 1859 70% de la loĝantoj de Bjalistoko estis judoj (en 1895 – 76%!). Tiu ĉi juda fono tutcerte influis lin. La fakto,

ke li en Bjalistoko kreskis inter judoj, ke li parolis denaske la jidan lingvon (apud la rusa), ke li lernis junaĝe la hebrean lingvon kaj la Biblion (Malnova Testamento), ke li konis sufiĉe bone la judajn religion kaj tradicion, ke poste en Varsovio li estis same ĉirkaŭita de judoj (preskaŭ sian tutan vivon li pasigis en la juda kvartalo de Varsovio) ĉio-ĉi ege influis la personecon kaj la mondkoncepton de nia Majstro. Li kreskis ĉe patro, kiu apartenis al la judaj kleruloj, nome konservis – unuflanke – parton de la judaj religiaj devoj, sed aliflanke apartenis al la liberalaj rondoj, nome al tiuj judoj, kiuj deflankiĝis de la ortodoksismo kaj adoptis la ĝeneralan klerecon, precipe tiun de la rusa kulturo. La patro Marko verŝajne ankoraŭ havis enkore la konflikton inter la du mondoj, sed la filo Ludoviko jam kreskis en alia epoko, kiam parto de la juda junularo forlasis la religiulan tendaron kaj serĉis la solvon por la problemoj de la judaro per (1) socialismo, aŭ (2) Cionismo (la tiam vekiĝanta nacia movado de la eŭropaj judoj, kiu celis revenon al la malnova hejmlando Israellando-Palestino), aŭ (3) asimiliĝo ktp.

**Kiel savi la judojn**

La juna studento Zamenhof, en 1881-2 – la jaroj de la kontraŭjudaj pogromoj – estis ekscitita kaj enprofundiĝis en la demandon kiel savi la judojn. En la komenco li subtenis la ideon, ke la orienteŭropaj judoj devas elmigri Amerikon. Li aperigis grandan artikolon en la ruslingva juda gazeto *Razsvet*, klopodante konvinki la judojn elmigri Usonon. La lasta frazo de la artikolo estis: "Ĝis revido, mia popolo, en la propra ĥato, sur la liberaj bordoj de Misisipo!" Sed ĉar sekvis je tiu ĉi alvoko de Zamenhof multaj akraj engazetaj kritikoj, li sufiĉe rapide ŝanĝis sian opinion kaj fariĝis... Cionisto. Li do tuj poste aperigis en la sama gazeto alian grandan artikolon, en kiu li vokis por enmigrado al Palestino. Zamenhof fariĝis tiam tre



*Zamenhof inter esperantistoj en Frankfurt, 1906*




*Zamenhof kaj urbestro en Cambridge, 1907*

fervora adepto de la cionisma liberiga movado. Li dum 3-4 jaroj aktivis en Varsovio sur tiu ĉi tereno. Li estis inter la pioniroj de la societo Ĥibat-Cion en Varsovio (temas pri movado, kiu antaŭis la grandan cionistan movadon de Herzl). En sia fama letero al Michaux (1905) li skribas: "Longan tempon en mia juneco mi estis varmega 'sionisto'. Mi laboris energie por tiu ideo."

Ĉirkaŭ 1885 li ĉesis okupiĝi pri cionista agado kaj transiris, fakte revenis, al la plej grava sia vivprojekto: La Internacia Lingvo. En 1887 li plene ĉesigis la kontakton kun la cionista movado. Interesaj estas la vortoj de Gaston Waringhien pri la tiama Zamenhof: "En la unua parto de sia vivo Zamenhof provis akordigi la du pasiojn, kiuj tiutempe dividis lian koron: la judan patriotismon kaj la homecan universalismon. Laborante samtempe kaj paralele por ĉiu el ili, por la bono de la juda gento kaj por la feliĉo de la homaro, li sentis en si ian harmonian ekvilibron kaj trankvilan konsciencon." ("*1887 kaj la sekvo*...", Stafeto, Antverpeno-La Laguna, 1980).

La fervora okupiĝo de la juna Zamenhof pri solvo de la problemo de la judoj montras, ke li estis granda amanto de sia malfeliĉa hebrea popolo. Dum kelkaj postaj jaroj li ne agis sur la kampo de "savado de la judoj", sed la temo revenis en la komenco de la 20-a jarcento, en formo de Hilelismo.

**Projekto de solvo de la hebrea demando**

Multaj esperantistoj ne scias, ke la celo de tiu ĉi fama projekto de Zamenhof, kiu antaŭis la pli faman Homaranismon, estis "Projekto de solvo de la hebrea demando". Tio signifas, ke male al la posta 'universala' Homaranismo, Hilelismo celis solvi nur la problemon de la judoj. Mi deziras citi la vortojn de la forpasinta erudicia judo Naftali Cvi Maimon, kiu estis unu el la plej gravaj Zamenhofologoj. En sia tre grava libro *La kaŝita vivo de Zamenhof* li skribas: "Dum la daŭro de multaj jaroj Zamenhof ne ĉesis mediti pri sia ideo. Kvankam fordonita

al Esperanto kaj al batalo por la ĉiutaga pano, li trovis tempon por Hilelismo kaj ĉiam denove ĝin pripensis.” Zamenhof rigardis la internacian lingvon kiel necesan aldonaĵon al Hilelismo. En 1901 li aperigis tiun ĉi projekton broŝurforme. Ĝia sorto ne estis favora. Mi deziras substreki kelkajn punktojn, per kiuj Zamenhof ‘fermis la cirklon’ rilate Cionismon: Dum siaj studentaj jaroj li ja estis arda subtenanto de la juda nacia movado Cionismo, sed en *Hilelismo* la mezaĝa Ludoviko ne plu pledas por Cionismo. Estante jam “kosmopolito” kaj akra kontraŭulo de ĉiu speco de nacionalismo, li skribas, ke “judeco” devas esti nur religio, ne nacio; ke la judan religion oni devas reformi kaj “purigi”; ke la Cionismo estas utopio neefektivigebla; ke la hebrea lingvo ne taŭgas por la judoj, ĉar ĝi ne estas viva; ke Esperanto estu la lingvo de la judoj.

Kiel judo loĝanta en Israelo mi permesas al mi deklari, ke almenaŭ rilate kelkajn el la supre menciitaj ideoj, Zamenhof estis tre malbona profeto...

La historio de tiu broŝuro estas kurioza: nur malmultaj esperantistoj konis la verkon pri Hilelismo, pro tio ke ĝi estis ruslingva. Zamenhof skribis, ke li dissendis etan parton de la eldonkvanto al ruslandaj judaj intelektuloj, kaj la ceteron li ricevis de la presejo nur en 1903 kaj kaŝis ĝin en sia ŝranko. Nur en 1972 aperis unuafoje ĝia Esperanta traduko, farita de Holzhaus en iom lama lingvaĵo. Li eldonigis ĝin tiujare ĉe Fondumo Esperanto (Helsinki). Tre verŝajne la sola ekzemplero de la broŝuro estas tiu, kiu troviĝas en la Nacia Biblioteko, Jerusalemo. En 2006 aperis finfine bona traduko de *Hilelismo* far Aleksander Korĵenkov (*Mi estas Homo*, Sezonoj, 2006).

Sed malgraŭ siaj novaj opinioj pri Cionismo, la mezaĝa Zamenhof plu amis la ideon, same kiel li kore plu favoris la judismon. Li esprimis tion kelkfoje dum siaj lastaj jaroj. Ekzemple, en la supre menciita letero al Michaux li skribas: “...Mi venis al la konvinko, ke tiu ĉi ideo (Cionismo – J.Ŝ.) kondukos al nenia celo kaj tial mi forĵetis tiun ĉi ideon, kvankam en la koro ĝi restis por mi ĉiam kara, kiel agrabla sed neplenumebla revo.”

**Amafero kun la jida**

Zamenhof havis amaferon ne nur kun Esperanto, Cionismo kaj Homaranismo. Li amegis, almenaŭ junaĝe, ankaŭ la jidan lingvon (‘judgermana’, la lingvo kiu estis uzata tiutempe de la plimulto de la orienteŭropaj judoj). Kiel infano li uzis ĝin hejme kun sia patrino (kun la patro li parolis ruse) kaj surstrate kun la judaj najbaroj. Do li certe regis ĝin perfekte. Dum la jaroj 1879-1881 li dediĉis sin al tiu ĉi lingvo, verkante studaĵon pri ĝia gramatiko. Temis pri pionira, revolucia projekto – ruslingve verkita – kiun li titolis *Pri jida Gramatiko kaj Reformo en la Jida Lingvo*. Tiu ĉi verko estis (parte) publikigita nur en 1909 en iu jida revuo en Vilno, sed ŝajne seneĥe. Krom tio, en 1881, la jaro de la pogromoj, Zamenhof verkis kelkajn poemojn en la jida, kiel suplementon al la jida *Gramatiko*. En ili li priploras la suferadon de la juda popolo en orienta Eŭropo. En sia enkonduko al la jida *Gramatiko* skribas la 22-jara Zamenhof: “Mi amas la tiel nomatan “ĵargonon” (jida lingvo – J.Ŝ.) ege... Milionoj da niaj fratoj parolas kaj por longe parolos ĝin... Pro tio ni devas la ĵargonon serioze trakti.” Sed same kiel okazis rilate Cionismon kaj aliajn temojn, la pliaĝa Zamenhof, komence de la nova jarcento, ŝanĝis sian opinion ankaŭ pri tiu ĉi lingvo.

En *Hilelismo* li skribas pri ĝi: “... ni venis al konkludo, ke tio ĉi estus afero sen iu celo kaj estonteco”.

Interesa temo estas la rifuzo de Zamenhof aliĝi al la ĵus fondita Tutmonda Esperantista Hebrea Asocio en 1914.

Responde al ilia invito pri membriĝo li skribas, ke li ne povos aliĝi kiel membro, ĉar kiel homarano li preferas stari ekster iu ajn nacia organizo: "Mi ne povas ligi min kun la celado kaj idealoj de speciala gento aŭ speciala religio." Sed li tamen skribis, ke li tre ĝojas pro la fondo de la hebrea (juda) asocio kaj aldonis: "Mi deziras al vi energion kaj paciencon; se Vi tion havas, tio donos al Vi plej bonan sukceson."

**Mi estas hebreo**

Antaŭ ol resumi mi deziras aperigi plian citaĵon el lia letero al Michaux: "Ĉar tuj en la komenco de mia rakonto mi devus necese raporti, ke mi estas hebreo kaj ĉiuj miaj idealoj, iliaj naskiĝo, maturiĝado kaj obstineco, la tuta historio de miaj konstantaj bataladoj internaj kaj eksteraj – ĉiuj estas sendisige ligitaj kun tiu ĉi mia hebreeco."


Jen interesaĵo: kiel vi certe rimarkis, mi kelkfoje citis frazojn el la fama letero de Zamenhof al Michaux, kiu lernigas al ni multon pri sia verkinto. Do, tiu ĉi letero el 1905 estis publikigita nur en... 1933, en *Enciklopedio de Esperanto* eldonita en Budapeŝto, sed sen la fragmentoj, kiuj parolas pri la judeco de Zamenhof. Ili estis plene forigitaj – memoru la tiaman Eŭropon kun ĝia antisemitismo! La redaktoro G. Waringhien klarigis poste, ke la letero estis cenzurita de la eldonistoj. La kompleta letero aperis nur en 1948 kadre de la *Leteroj de L.L. Zamenhof* kompilitaj de la sama Waringhien.

**Resume**: ni vidis, ke Zamenhof estis ege influata de sia judeco, ke li estis konscia pri tiu afero, kaj ke li kelkfoje substrekis tion skribe. Tamen mi opinias, ke pravis Maimon per la jenaj vortoj: "La demando, kiu nun leviĝas, estas jena: Se Polujo estis la lando de lia loĝado, se li sentis Litovujon sia patrujo, se laŭ nacieco li sin alkalkulis al la juda popolo: al kiu li apartenas? Nia respondo estas simpla: Li apartenas al neniu, krom al si mem. Sed la plej trafan respondon donis Zamenhof en la fino de sia Kongresa Parolado en Bulonjo-sur-Maro, 1905: 'Sed tiel same kiel mi en la nuna momento ne estas ia naciano, sed simpla homo, tiel same mi ankaŭ sentas, ke en tiu ĉi momento mi ne apartenas al ia nacia aŭ partia religio, sed mi estas nur homo'."

*Kun permeso redonita de UEA-revuo Esperanto n-ro 3, 2009.*



*Zamenhof kaj urbestro en Cambridge, 1907*




# Pri la agado en Rumanio

de Mihai Trifoi

Inter la 5-a kaj 7-a de oktobro 2012 la rumanaj esperantistoj renkontiĝis en Răscruci (Cluj) por partopreni la Tutlandan Esperanto-Simpozion, kies temo estis *Esperanto kaj edukado.*

En la unua parto de la simpozio estis prelegoj. Inter la 14 prelegintoj troviĝis ankaŭ Mihai Trifoi, kies prelego havis la titolon *La mondo laŭ la vizioj de Zamenhof kaj Martinus.*

La tuta aranĝo estis tre interesa. Okazis ekskursoj, vizito de muzeoj kaj preĝejoj, kunsidoj, distra programo, debatoj. Unu el la allogaj programeroj



*Mihai Trifoi prelegas en Rumanio*

estis la *Konversacia rondo*, kiu realiĝis en du partoj. En la unua parto la instruisto Mihai Trifoi prezentis la libron *TEMAGEMO* de Felszeghy Judit. El la temenhavo de la libro la gvidanto de la Konversacia rondo elektis la temon *Manĝado* (manĝoj, manĝilaroj, manĝmanieroj, kutimoj, receptoj ktp.). Sub la titolo *Ni manĝas por vivi aŭ ni vivas por manĝi?* la konversacio fariĝis ege debatema.

En la sekva tago okazis la dua parto sub la titolo *Viandmanĝanto aŭ vegetarano?* La partoprenantoj estis aranĝitaj en du grupoj: "viandmanĝantoj" kaj "vegetaranoj" kaj ĉiuj parolantoj argumentis kaj kontraŭargumentis en tre amika kaj bonhumora etoso. Ekzemple iu partoprenanto, D-ro István Budaházy de Oradea science argumentis kial la homo devas manĝi viandon; aliaj kelkaj subtenis lin. Sed s-ino Anna Bartek (Anjo) el Hungario kontraŭargumentis kaj klarigis kial la homo devas fariĝi vegetaran. Je la fino de la "debato" la gvidanto rekomendis por legado *La idealan nutraĵon* de Martinus, kaj al kelkaj pli interesataj li donacis broŝurojn *Optimisma vivkoncepto* de Ib Schelicher kaj *Antaŭparolo de Livets Bog* de Martinus, en la rumana traduko.

Tutcerte ke la diskutoj restis kaj efikis en la memoro de multaj partoprenantoj.

Estus menciinda ankaŭ la fakto, ke ĵus antaŭ ol vojaĝi por partopreni la simpozion, Mihai Trifoi finis la tradukadon de *Livets Bog 1* el Esperanto al la rumana lingvo.



# Karmo – tikla temo

de Olav Johansson

"*Vi kaj mi estas dotitaj per du manoj, du piedoj kaj sufiĉe taŭga cerbo. Sed aliaj ne naskiĝis tiel, kaj tio estas pro kialo. Temas pri la karmo kiu revenas de alia vivo. Tion, kion vi semas, vi ankaŭ rikoltos.*" (Glenn Hoddle)

**1. Opinio pri karmo**

Kiam la eksa futbala stelulo kaj teamestro de la angla nacia futbala teamo, Glenn Hoddle, sin esprimis en la supre citita maniero en gazeta intervjuo, tio kaŭzis grandan indignon. Ne nur en la amaskomunikiloj kaj ĉe lia dunginto – la angla futbala asocio – sed ankaŭ sur la plej alta registara nivelo. Ĉefministro Tony Blair anoncis ke se Hoddle vere estis tion dirinta, li devas rezigni la postenon kiel angla teamestro. Post tio la pilko jam estis ekruliĝinta, se paroli per futbala ĵargono. Ne plibonigis la aferon ke Hoddle klarigis ke li estis miskomprenita (ne miscitita, sed miskomprenita) kaj ke li pardonpetis al ĉiuj kiuj eventuale estis vunditaj pro lia eldiro. La angla futbala asocio decidis nuligi lian kontrakton kun tuja efektivigo.



*Glenn Hoddle*

**2. Karmo kaj handikapo**

De tio ĉi, ni ĉiuj povas ion lerni. Precipe ke la demando pri karmo estas temo tre delikata kiun oni alproksimiĝu nur kun plej granda antaŭzorgo, konsideremo kaj proksimula amo. El strikte kosma vidpunkto, la eldiro de Hoddle estas tute ĝusta. Martinus ja klarigas ke denaskaj handikapoj, ĉu fizikaj, ĉu psikaj, estas karmaj konsekvencoj de vivmaniero en antaŭa vivo, kiu estis en malharmonio kun la vivleĝoj. (Vidu ekzemple *Livets Bog 1*, § 283). Ekzemplo pri vivmaniero kiu povas kaŭzi tiajn efikojn estas severa kaj longdaŭra misuzado de alkoholo aŭ narkotaĵoj. Tia misuzado ne nur difektas la nunan korpon kaj animon de la individuo, sed ankaŭ difektas la *"talentokernojn"* en la superkonscio, kiuj laŭ la kosmaj analizoj respondecas pri la kreado de la fizika organismo kaj ties sensara ekipo.

Do montriĝas ke tute ne temas pri "peko" aŭ "puno". Estas nur natura aŭ logika daŭrigo de la detrua proceso ekigita de la individuo mem kaj kies efikojn oni jam en la nuna vivo povas rimarki. Neniu prudenta persono ja neas ke tiuj videblaj efikoj rilatas al la vivmaniero en la nuna vivo. Se la reenkarniĝo, kiel Martinus montras, estas *organa principo de kontinueco* – bazita je tio kion li nomas la *"talentokerna principo"* – ni povas kompreni ke ankaŭ

*denaskaj* vundoj kaj handikapoj havas sian kaŭzon en antaŭa vivo. Ne troviĝas io moralpredika aŭ malplivaloriga en tia konstato, same kiel ne troviĝas io moralpredika en la konstato ke oni malsekiĝas se oni saltas en akvon. En ambaŭ kazoj temas pri kaŭzo kaj efiko.

Por personoj al kiuj la penso pri reenkarniĝo estas fremda, la afero kompreneble aspektas alia. Kaj supozeble ne malutilus doni al tio ioman konsideron antaŭ ol fari eldiron rilate al tia temo. La risko fariĝi miskomprenata kaj vundi la sentojn de certaj homoj estas granda. Ĝuste tio ja okazis al Glenn Hoddle, kaj, kiel dirite, de tio ni ĉiuj eble povas ion lerni.




Kiam la amaskomunikilaj ĵurnalistoj referencis kaj komentis la eldiron de Hoddle, oni priskribis lian eldiron kvazaŭ li estus dirinta ke denaska handikapo estus "puno" pro "pekoj" en antaŭaj vivoj. Tion li ja ne diris (vidu la citaĵon supre), kaj sen pli proksima scio pri kiel Hoddle interpretas aŭ konceptas la penson pri reenkarniĝo kaj karmo, mi supozas ke ĝuste tion li celas kiam li diras ke li estis "miskomprenita". Nome temas pri tio ke ekzistas tre grava diferenco inter la penso pri "peko kaj puno" kaj la penso pri karmo. Povas esti ke multaj materiisme pensantaj observantoj kaj raportistoj tiun diferencon preteratentas, sed ĝuste tial necesas ĝin mencii per aldona emfazo.

### 3. Semado kaj rikolto

La nocio karmo tute ne rilatas al "peko kaj puno". Kiel ni jam tuŝis, temas pri la leĝo pri kaŭzo kaj rezulto. Ĝuste tiu sama leĝo pri kaŭzo kaj rezulto kiun la materia scienco tiel meritoplene kartografiis al ni en la fizika sfero. La spirita scienco montras al ni ke la sama leĝeco validas en la spirita dimensio de la vivo, alivorte, "ĉion, kion oni semas, tion oni ankaŭ rikoltos". Temas pri vero same aplikebla, ĉu temas pri semado kaj rikoltado en onia fizika ĝardeno, ĉu en la spirita. Kial estas tiel? Tute simple, ĉar ĉiu manifestaĵo en la formo de pensoj kaj agoj implicas elsendon de energio kiun ni ne povas vidi nek tuŝi (temas pri elektromagnetaj fortoj en altfrekvenca formo) – kaj energio povas, laŭ la leĝo de movo, nur iri en cikloj. La leĝo de karmo do estas identa kun la cikloprincipo, la leĝo kiun ni ĉi tie en la fizika sfero konas kiel la leĝo de reveno aŭ reiro, ĉar ĝi ligas ĉian energion en cikloj. Tio signifas, ke ĉio, kion ni elsendas, bonon kaj malbonon, pli aŭ malpli frue – en tiu ĉi aŭ en venonta vivo – revenos al ni mem en la formo de vivtravivaĵoj aŭ sorto.

Tion dirinte, necesas aldoni ke la nocio de karmo – almenaŭ ĉe Martinus – ne nur reprezentas blinde aŭ aŭtomate laborantan naturan leĝon. Tio ke ni rikoltos kion ni semis, estas io valora aŭ dezirinda nur dum ĝi ankoraŭ servas al *pedagogia* celo, tio estas, tiel longe kiel ni ankoraŭ havas ion por lerni en la lernejo de la vivo. Kiam ni jam estas lernintaj tion kion ni povas lerni sur certa kampo, ni, laŭ Martinus, estas dotitaj per *"karma imuneco"* en la koncerna kampo. Tio signifas imunecon kontraŭ revenantaj sortoenergioj el malluma aŭ dolora naturo. Ĝuste tiu "principo de imuneco" rivelas ke la leĝo de karmo ne nur estas leĝo de justeco sed ankaŭ en la plej alta grado, leĝo de *amo*. Neniu do devas suferi pli ol estas absolute necese por kondukiĝi en la homan regnon de amo, al kiu la evoluo nun kondukas nin. El kosma perspektivo, neniu suferas pli ol iu alia por atingi tiun celon. Rigardite

super la enkarniĝoj, la kvanto de suferoj egaliĝas – se tio ne estus la kazo, la *malplej* suferintaj fariĝus la *plej* handikapitaj en la travivado kaj ĝuado de la vivo, ĉar *"la doloro estas la mezurilo per kiu ĝojo mezuriĝas"* (malnova Tibeta proverbo).

**4. La transformiĝo de la sorto**

En mia persona sperto, la afero kiu plej gravas emfazi, rilate al la leĝo de karmo, estas la eblōj kiujn ĝi donas por *superi* niajn proprajn suferojn kaj per tio krei pli helan sorton. Tio ke oni mem estas la kaŭzo de la doloro kaj suferado kiun ni renkontas en la vivo, tio ja ankaŭ signifas ke ni povas ion fari por solvi la problemojn! Imagu se la sorto nin trafus blinde kaj laŭhazarde – kiel multaj materiistoj imagas – aŭ ke ĝi estas puno de pli alta potenco – kiel certaj religiuloj kredas – tiukaze niaj propraj agoj ja tute ne gravus. Tiuj filozofioj de senespereco kaj martireco akre kontrastas al la karmoleĝa kompreno pri sortokreado. Tiu kompreno fokusigas la individuon kaj lian kaj ŝian propran respondecon kaj proprajn eblecojn.

En la nuno, mi rikoltas la konsekvencojn de tio kion mi antaŭe semis. Per mia maniero reagi, mi denove semos, kaj per tiu semado, mi ŝanĝas mian sorton en tiun aŭ alian direkton. Ni do neniam estas sklavoj sub tio kion ni semis en la pasinteco. La sorto estas fleksebla aŭ dinamika proceso de interagado kun la universo aŭ Dio.

Sed kiel la situacio do estas por tiuj homoj kiuj pro denaskaj handikapoj havas tre limigitajn eblojn agi en tiu ĉi vivo? Ĉu ili ne fariĝis sklavoj de tio kion ili semis? Eble tiel ŝajnas, sed ankaŭ ĉe ili efikas malrapide laboranta proceso de ŝanĝo kaj resaniĝo kiu en venontaj enkarniĝoj radikale transformos ilian vivsituacion kaj sorton. Pri tio Martinus skribis en la artikolo "La origino de la vivoforto", dana Kosmos 11-1996:

*"Troviĝas ĉe la homoj de nia tempo aro da devojiĝoj, kaj seksaj, kaj rilate al trouzado de narkotikaĵoj aŭ alkoholo. Tiaj devojiĝoj povas en venontaj enkarniĝoj konduki homojn en pli aŭ malpli grandan gradon de mensa malkapablo, aŭ kaŭzi denaskajn fizikajn difektaĵojn, kiujn la estuloj post kelkaj enkarniĝoj superos. Tiuj estuloj, kiuj en la pasinteco trairis la mallumajn statojn de devojiĝo, estos aparte dotitaj per spertoj kaj kapabloj pri kompato, tiel ke ili, kiam ili jam regajnis sian sanon, fariĝos la plej bonaj helpantoj kaj gvidantoj por homoj kies devojiĝinta stato similas al tiu kiun ili mem trairis."*

Traduko Henning Sato von Rosen en 2012.



En la nuno mi rikoltas la konsekvencojn de tio kion mi antaŭe semis, sed per mia maniero reagi, renkonte tiun rikolton, mi refoje semas ion, kio ŝanĝas mian sorton en tiun aŭ alian direkton. Tiel ni neniam estas sklavoj sub tio, kion ni antaŭe semis. La sorto estas fleksebla dinamika proceso kaj interagado kun la universo aŭ Dio.

*Simbolo n-ro 16 – La Eternokorpo. La klarigo de Martinus troveblas en la libro La Eterna Mondbildo*

# Martinus-Centro, Klint

**La centro en Klint**

Nova kulturo en bela pejzaĝo. Martinus-Centro troviĝas borde de la maro en belpejzaĝa kaj trankvila loko ĉe la vilaĝeto Klint okcidente de la urbeto Nykøbing Sjælland. Jam en 1935, Martinus fondis kurs- kaj feriejon en tiu loko, kaj kun la paso de la jaroj konstruis modernan kultur- kaj kursocentron kun prelegejo, kursoĉambroj, vegetara restoracio, loĝejoj por kursanoj kaj kampadejo.

**La ofertoj de la centro**

La centro ofertas instruadon kaj por novaj kaj por spertaj studantoj, sed samtempe ĝi estas trankvila oazo por spirite serĉantaj personoj. Oni povas partopreni kursojn, aŭskulti prelegojn kaj memstude enprofundiĝi en la spiritsciencan mondbildon, priskribitan en la verkoj de Martinus. Estante en la centro oni ĝui la inspiron de la hela kaj pozitiva atmosfero, kiu formiĝas pro la intereso de la partoprenantoj mem kontribui al tio, kio laŭ Martinus estas la praktika celo de la evoluo, nome la kreado de nova humana mondkulturo.

La ĉefa aktivaĵo de la centro estas la someraj kursoj, kiuj daŭras 6 semajnojn, ekde la fino de junio ĝis meze de aŭgusto. Printempe, aŭtune kaj ĉirkaŭ novjaro estas diversaj ofertoj en la formo de prelegoj kaj semajnaj aŭ semajnfinaj kursoj. Ankaŭ estas aranĝitaj laborsemajnoj trifoje jare, dum kiuj oni povas kombini praktikan laboron kun oferto de prelegoj kaj studoj. Kaj la instruado kaj la praktika laboro baziĝas grandparte sur volontula nepagita laboro.

Kiu venas al Martinus-Centro? – Ĉiuj, sendepende de vivkoncepto, estas bonvenaj al la centro kaj neniu sentu sin ligita de io alia ol sia propra opinio. Nenia asociformiĝo aŭ membreco estas ligita al la intereso pri la analizoj de Martinus.

La plejparto de la kursanoj kaj volontuloj venas el Skandinavio, sed precipe dum la internaciaj semajnoj de la somero, eblas renkonti interesatojn el diversaj landoj. Karakteriza komuna trajto por la partoprenantoj estas, ke ili per studado kaj apliko de la analizoj de Martinus tre deziras serĉi pli profundan komprenon pri la naturo de la vivo, ilia propra evoluo kaj la evoluo en la mondo. Do, restado en la centro donas riĉajn eblecojn por inspiraj diskutoj kaj agrabla amikumado kun abundo da vivĝojo en trankvila, vegetara kaj senfuma medio.

Vidu informojn pri kursoj kaj aliĝo ĉe www.martinus.dk, aŭ mendu la kursprogramon ĉe Martinus-Instituto



*La prelegejo en Klint*

# NOTOJ

**Tradukoj de la verkoj de Martinus**
La tradukado komenciĝis jam en la 1930-aj jaroj per la islanda, kiu fariĝis la unua lingvo al kiu artikolo de Martinus estis tradukita. Nun, unu aŭ pluraj el la verkoj de Martinus estas tradukitaj al la sekvaj 21 lingvoj: la albana, angla, ĉina, ĉeĥa, franca, germana, hispana, hungara, islanda, itala, japana, kroata, litova, nederlanda, pola, portugala, rumana, rusa, serba, sveda kaj Esperanto. Al unu el tiuj lingvoj, nome la sveda, la plejparto de la verkoj estas tradukita. La revuo Kosmos provizore eldoniĝas en la sekvaj ses lingvoj: la dana, sveda, angla, germana, nederlanda kaj Esperanto.

**Volontula laboro servante bonan aferon**
Ĉu vi emas aktiviĝi kiel volontula kunlaboranto? – Tio estas ŝanco por amikumi kaj samtempe sperti inspiran alirmanieron al la mondbildo de Martinus. En Martinus-Centro, Klint, la volontuloj faras taskojn pri ĉarpentado, purigado, ĝardenprizorgado kaj kuirado. En la Instituto en Kopenhago la laboro temas pri oficejaj taskoj, kontrolado de tekstoj, presado kaj kopiado, tradukado, ĝardenprizorgado kaj multaj aliaj aferoj.

Kontaktu Ole Therkelsen: esperanto@martinus.dk aŭ Eigil Kristensen: eigil@martinus.dk, tel. +45-20212768 (labortagoj 9-16).



INFORMO PRI
## LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.
La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la Interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 38 34 62 80
fakso (+45) 38 34 61 80
Telefontempo:
lundo-ĵaŭdo 13-16
vendredo: 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
UEA-kodo mins-d
www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk
shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen (respondeca), Mathias Dalmose kaj Jonas Dalmose.
Kompostado: Dan Elhaûge.

Abono: Jare 2 ekzempleroj
Prezo en EU: DKK 75,00 aŭ EUR 10,00
Prezo ekster EU: DKK 60,00 EUR 8,00 aŭ USD 12,00
Unuopa kajero: DKK 40,00
Se vi ne povas pagi per fremda valuto, demandu al la Instituto

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
Presita de Martinus Institut
ISSN 1600 4116.



Martinus-Instituto, fondita de Martinus en 1932 en Kopenhago, estas sociutila institucio, kies ĉefa tasko estas gardi la respondecon pri liaj verkoj. Tio signifas ke la Instituto unue prizorgu ke liaj verkoj konserviĝas en formo neŝanĝita, kaj due ke la verkoj eldoniĝas en la originala lingvo kaj ankaŭ tradukiĝas al aro da aliaj lingvoj.

Martinus mem loĝis en kaj laboris Martinus-Instituto ekde 1943 ĝis sia forpaso en 1981. En la Instituto okazigas prelegojn, seminariojn kaj studrondojn. La domo enhavas ankaŭ la administradon, eldonejon, librovendadon kaj la eldonadon de la revuo Kosmos. Krom esti laborejo por kelkaj konstantaj dungitoj, la domo estas ankaŭ renkontejo por aro da volontulaj kunlaborantoj, kiuj kontribuas al la realigo de granda parto de ĉiuj taskoj de la Instituto. Hodiaŭ la loĝejo de Martinus estas muzeo, vizitebla post interkonsento kun la Instituto. Pli da informoj ĉe www.martinus.dk

